Kiom da jaroj

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Kiom da jaroj en nia ĉielo
lumo forestis?
Alkutimiĝis ni al kandeloj
kaj al majesto.
Kiom da jaroj niaj okuloj
vidis nenion?
Krom nia grandega honora tabulo,
Respondis kiu?

Kiom da jaroj la niaj dentoj
premis la vortojn?
Regis en nia mondo silento,
laûtaj raportoj.
Kiom da jaroj kantas ni kantojn
laû kalendaro?
Kaj sen respondoj estos demandoj
kiom da jaroj?

Niaj gepatroj ne povas respondi
kiom da jaroj
necesas por ni por purigi la mondon
de iliaj eraroj.
Kaj mi ne vidis multon hieraû,
sed jam hodiaû
devas respondon mi mem trovi veran
sufloros neniu!